Politika situacio en Orienta Eŭropo:

Ĉu Pollando estos baldaŭ perdita?

Kiel la lando de Zamenhof kaj Esperanto riskas fariĝi pario en Eŭropo sub la regado de PiS

Analizo de la aktuala politika stato de Pollando en 2017

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)

Lech kaj Jarosław Kaczyński, Beata Szydło, Andrzej Duda, Bronisław Komorowski, Donald Tusk (fotoj: Vikipedio)

Du jarojn post kiam la partio „Juro kaj Justeco“ (Prawo i Sprawiedliwość – PiS) komencis regadi en Pollando, la rilatoj kun la ĉefaj membroŝtatoj de Eŭropa Unio troviĝas en profunda krizo. Tio kaŭzis en Eŭropo grandan miradon, ĉar depost la falo de la komunismo kaj la aliĝo de Pollando al Eŭropa Unio en 2004 Varsovio aplikis kurson de eŭropa lojaleco kaj interkonsento kaj partoprenis en ĉiuj gravaj decidoj kaj projektoj de EU kaj NATO. Tiu harmonio bone funkciis ĝis la jaro 2005, kiam anonciĝis la „erao Kaczyński“, kvazaŭ kiel sola alternativo al la maldekstro, kiu diskreditiĝis pro financaj skandaloj kaj kazoj de korupto. La parlamentajn balotojn de tiu jaro la „Unuiĝo de Demokratiaj Maldekstruloj“ nete malgajnis favore al dekstra alianco sub la gvido de **Jarosław Kaczyński** (nask. 1949), gvidanto de la naciisma-konservativa partio PiS. Lia ĝemela frato **Lech** eĉ fariĝis ŝtatprezidento. La poloj atendis de la nova potenco, ke ĝi reordigu la politikon en la lando, kiu riskis droni en la kaoso. PiS promesis helpi al tiuj homoj, kiuj havis problemojn pro la ekscesoj de la kapitalismo, kiu furoras en Pollando. Depost 1989 ĉiuj sferoj de la vivo estis koncernataj de la nova evoluo, kiu ŝanĝis praktike ĉion: la homajn kaj sociajn rilatojn, la familiajn strukturojn, la klerigan sistemon, la tradiciajn hierarkiojn kaj elitojn, la vivstilon, la rilatojn inter la seksoj, la sintenon al la laboro kaj la statuson de la libertempo, la rilatojn inter la plimultoj kaj malplimultoj. Tiu evoluo disvolviĝis en Pollando multe pli rapide ol en la okcidentaj landoj, kie la progreso havis tempon dum jardekoj. La dujara regado de PiS estis karakterizata de la ĉasado de politikaj kontraŭuloj, fortigo de la naciisma tono kaj kunlaborado kun radikalaj partioj. Sed la dekstra koalicio baldaŭ rompiĝis. La sekvaj anticipaj balotoj de la 21a de oktobro 2007 estis gajnitaj de la „Civitana Platformo“ (PO), kiu formis, kun siaj koalicianoj, inter novembro 2007 kaj novembro 2015, tri registarojn. Sed PiS, kiu tenis siajn elektantojn varmaj, restis la plej forta opozicia partio kaj establis sian movadon kiel kvazaŭan paralelan ŝtaton kontraŭ la liberalisma politika „malamiko“, al kiu oni riproĉis, ke ĝi celas starigi diktaturon en alianco kun Germanio kaj Ruslando. **Donald Tusk** (nask.1957), kiu en 2011 estis reelektita kiel ĉefministro de Pollando, iris en decembro 2014 kiel prezidanto de la Eŭropa Konsilio al Bruselo. En la ofico de la ĉefministro sekvis lin Ewa Kopacz, kiu restis pala figuro sen signifo, kvankam ŝi okupis altajn politikajn poziciojn. Post kiam la 10an de aprilo 2010 Lech Kaczyński pereis en iom mistera aviadila katastrofo en Ruslando, **Bronisław Komorowski** (nask. 1952) transprenis provizore la oficon de la prezidento kaj en la anticipaj prezidentaj elektoj de somero 2010 estis elektita kiel posteulo de la mortinta ŝtatestro. La tragika morto de Lech Kaczyński fariĝis enorma traŭmato por parto de la pola socio, kiu nun servas al dubindaj politikaj celoj de PiS. La parlamentaj balotoj de 2015 denove ŝanĝis la partian strukturon de Pollando favore al PiS, kiu venkis la konkurson kaj eĉ akiris la absolutan plimulton de la mandatoj en la parlamento, kvankam

ĝi ricevis nur 37% de la voĉoj; escepte de la du pomeraniaj vojevodioj ĝi rikoltis la plimultajn voĉojn en ĉiuj ceteraj regionoj, eĉ en la okcidentaj, kie antaŭe la „Civitana Platformo“ estis la ĉampiono. Tiel, de novembro 2015 Pollando estis regata de kabineto sub ĉefministrino **Beata Szydło** (nask. 1963), kiun la politikaj observantoj kaj parto de la amaskomunikiloj konsideris nura plenumantino de la volo de Kaczyński kaj kun kiu en okcidenta Eŭropo neniu vere emis rilati, ĉar ŝia ĝisosta maniero politikumi fortimigis ĉiujn partnerojn. **Andrzej Duda** (nask. 1972), alia ridinda marioneto en la teatro de Kaczyński, fariĝis nova prezidento de la pola respubliko, kiu do falis sub preskaŭ totala kontrolo de PiS, almenaŭ sur nacia registara ebeno. Tia rezulto tute ne plaĉas al la politikistoj de EU en Bruselo kaj aliaj okcidentaj membroŝtatoj, kvankam oni ne povas kontesti la demokratian korektecon de la balotoj kaj la volon de la popolo de Pollando. Por iuj EU-diplomatoj la PiS-regado de Pollando signifas specon de absoluta hororo. Granda potencialo por novaj konfliktoj!

Malgraŭ la sennombraj kvereloj, kiujn la PiS-registaro lanĉis kun Eŭropa Unio, la apogo al la EU-membreco estas en la pola loĝantaro daŭre senŝanĝe alta (ĉ. 88 procentoj), kvankam en Pollando jam cirkulas la legendo pri la scenaro „Polexit“ („poleliro“) laŭ la modelo de Britio. La konsekvencoj de tia opcio, kiun la pola registaro tamen ne celas, estus neantaŭvideblaj por ambaŭ flankoj.

Sed kion la PiS-registaro entute celas?

Por kompreni tion, necesas unue priskribi la trajtojn de la idearo de tiu ĉi partio, kiu estas konsiderata kiel naciisme-konservativa, kristandemokratia kaj dekstre-popolisma, kaj karakterizi ĝian programon, kiu baziĝas sur la ´Law-and-Order´-principaro, kiu konsistas i.a. el la plifortigo de la batalo kontraŭ krimeco kaj korupto. Sur eŭropa nivelo PiS estas gvida faktoro en la movado de konservativuloj kaj dekstraj reformemuloj. Antaŭ ĉio, PiS estas radikala kontraŭkomunisma partio, kun forta malŝato de ĉio maldekstra kaj liberalisma kaj firma apogo sur la mondkoncepto de la katolika eklezio. Inter la dekstraj partioj de Eŭropo, PiS okupas specialan pozicion inter konservemaj, iel kristandemokratiaj kaj naciismaj-popolismaj movadoj, kiujn la politologoj perceptas kiel novan tipon en la partia pejzaĝo de Eŭropo.[1] En la kazo de PiS specifa estas ĝia obseda pola naciismo, kiu sisteme flegas kontraŭ-germanismajn kaj kontraŭ-rusismajn emociojn kaj priservas la memoron pri la malfacilaj historiaj spertoj, kiujn la pola nacio faris kun germanoj kaj rusoj, kiuj estas konsiderataj de PiS ĉefmalamikoj de la pola nacio.

PiS estis fondita en 2001 de Lech Kaczyński kaj lia ĝemela frato Jarosław Kaczyński. Lech tiam oficis kiel justicministro kaj en 2002 fariĝis ĉefurbestro de Varsovio. Al tiu partio aliĝis diversaj aliaj politikistoj el la medioj de la sindikato „Solidareco” kaj de ROP.[2]

En la interna politiko PiS akcentas la prioritatojn de la pliakrigo de la punkodo kaj, kiel dirite, de la batalo kontraŭ la krimeco kaj korupto. Laŭ la „Indekso pri korupto” de la asocio Transparency International, Pollando okupas nuntempe la 29an rangon, post la Arabaj Emiratoj, sed tamen antaŭ Litovio, Hispanio, Malto kaj aliaj EU-ŝtatoj. Tio ne estas malbona pozicio. PiS kreis la „Centran Oficejon pri kontraŭkorupto”, por kiu en la Sejmo voĉdonis 354 deputitoj, dum 43 estis kontraŭ kaj 63 sindetenis. PiS postulas krome la diskonigon de la stato de la posedaĵoj de politikistoj kaj oficistoj por fari ilian privatan situacion pli klara. Krom tio ĝi volas enkonduki novan konstitucion de la „Va Respubliko” por forviŝi la komunisman heredaĵon. Tiu konstitucio, kiu antaŭvidus la enkondukon de miksita parlament-prezidenta regadosistemo laŭ franca modelo, havigus al la prezidento de la ŝtato pli grandajn jurajn kompetencojn. Oni povus apliki la mortpunon, aperigi ĉiujn dokumentojn el la tempo de la komunismo kaj publikigi la nomojn de ĉiuj komunismaj sekretaj agentoj. Kiel ĉefa ekstera simbolo de la komunisma erao la Palaco de la Kulturo kaj Scienco en Varsovio devus esti malkonstruita kaj malaperi el la ĉefurbo. Ĉiuj tiuj modifoj evidente ebligus al la ŝtatprezidento manipuli la aferojn en la senco PiS, kio estus tute konforma kun la intenco de Kaczyński, kiu volas ŝanĝi la aferojn en Pollando laŭ sia gusto kaj povus fariĝi io simila kiel malgranda diktatoro, kun fatalaj konsekvencoj por la demokratio, la lando kaj popolo, ĉar ankaŭ la juro kaj justico devus esti kontrolataj de la registaro. Ekzemple PiS deziras, ke la justicministro estu samtempe ĝenerala prokuroro. Oni parolas pri puĉo kontraŭ la justico. EU-Bruselo tute ne povas aprobi tian ideon, kiun ĝi kontraŭbatalos per ĉiu forto, ĉar

[1] Vd. Hillebrand, E. (eld.): Rechtspopulismus in Europa: Gefahr für die Demokratie? Dietz, Bonn 2015. (http://opac.nebis.ch/objects/pdf03/e19_978-3-8012-0467-9_01.pdf)
[2] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Solidareco_(Pollando) kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Movement_for_Reconstruction_of_Poland

ĝi subfosas la sendependecon de la justico kaj damaĝas la demokration entute. Sen esti impresita de la avertoj el Bruselo, la pola Sejmo tamen puŝis la koncernajn reformojn antaŭen.

En la ekonomio PiS celas ekvilibritan „bonfarto-ŝtaton“, en kiu la registaro povu interveni laŭdezire por reguligi la ekonomion kaj socion, por ke ĝi povu egalrajte profiti de la nacia enspezo. La partio do promesas „solidarecan Pollandon“, kiu estas koncepto, kiu povas kontrasti kun la koncepto de „liberalisma Pollando“, por kiu pledas la „Civitana Platformo“ (PO). Laŭ la volo de PiS personoj, kiuj enspezas pli ol 300´000 zlotojn (t.e. ĉ. 71´270 eŭrojn), devus pagi imposton de 39 procentoj, dum malgrandaj entreprenoj devus pagi nur 15 procentojn. Entreprenoj kaj familioj devus profiti aliajn avantaĝojn, laŭ brita modelo, kaj entreprenoj en regionoj kun malforta ekonomio devus esti subtenataj de la ŝtato. Familioj ricevu pli da mono por novaj infanoj. La aldonvalora imposto estu reduktita. Laŭ sia logiko PiS volas eviti la privatigon de strategie gravaj ŝtataj entreprenoj. Por malpliigi la senlaborecon inter la junularo, junaj laboristoj devus pagi nur la duonon de rentaj kotizoj. Viroj devus povi pensiiĝi en la aĝo de 65, virinoj kun 60 jaroj. La kritikantoj de tiu ekonomia modelo riproĉas al PiS, ke ilia kalkulado estas tro optimisma, t.e. tro bela. Sed PiS antaŭvidas ankoraŭ tutan serion de aliaj reformoj: La parto de eksterlandaj posedantoj de polaj amaskomunikiloj estu reduktita per kontraŭmonopolisma leĝo, la kleriga sistemo estu reformita tiel, ke la gimnazioj estu abolitaj kaj anstataŭigitaj per alia modelo, laŭ kiu la lernantoj devus frekventi la bazan lernejon dum ok anstataŭ ses jaroj. Dum la partopreno en la registaro en la jaroj 2005-7 tiuj planitaj ŝanĝoj tamen ne estis efektivigitaj.

La ekstera kaj eŭropa politiko de PiS antaŭvidas la fortigon de la nacia suvereneco de Pollando favore al la propra avantaĝo. Do, PiS iusence celas puŝi politikon laŭ la principo „Pollando unue“. PiS ne celas nuligi la aliĝon de Pollando al Eŭropa Unio, sed precipe rilate la politikon pri familio, geedziĝo, edukado, aborto, morthelpo kaj samseksemo ĝi volas apliki pli konservativan, tradician, do malliberalan politikon, apogante sin je la valoroj predikataj de la katolika eklezio, kiu daŭre estas forta piliero de la pola socio. Tia konservativa politiko do kontrastus kun la pli liberalismaj tendencoj en la landaro de EU. Aliflanke, PiS deziras integriĝon de Pollando en la eŭropajn strukturojn sur la kampoj de la sekureco, defendo kaj energio, kvankam PiS ne volas rezigni pri la utiligo de la terkarbo. Andrzej Duda eĉ parolis pri la neceso de eŭropa armeo, se ĝi ne konkurencas NATOn, kies utilon kaj neceson la poloj ne pridubas. PiS rifuzis la „Traktaton pri eŭropa konstitucio“, sed defendis la kontraktojn de Nico kaj Lisbono. Sub la regado de PiS Pollando elpaŝis kiel advokato de la interesoj de Ukrainio, Moldavio kaj Belorusio kiel potencialaj kandidatoj por aliĝi al EU. En formo de EU-membroj tiuj landoj certe servus kiel ideala bufra zono inter Pollando kaj Rusio kun la ebleco influi ilin en la senco de Varsovio. Dum Belorusio devus unue liberiĝi de sia kaprica diktatoro, kiu ŝajne estas neniel influebla, kun Ukrainio devus esti solvita la konflikto pro la masakro en Volhinio kaj orienta Galicio kontraŭ la pola loĝantaro dum la dua mondmilito. La tradicia skeptiko pri Germanio kaj Ruslando restas konservata, kvankam ekzistas politikaj grupiĝoj, kiuj pretas disvastigi inter poloj la narativon de la Kremlo. Sed la propagando de Putin ĝenerale ne efikis en Pollando kaj ne povis konvinki la polojn, ke en la ukraina krizo kulpas iu alia ol Ruslando mem. Aliflanke, la strategia kunlaboro kun Usono estis akcelata, sendepende de tio, ĉu tie regas Obama aŭ Trump, kio inkluzivis la planon de la instalado de usona kontraŭraketa defenda sistemo, kontraŭ kiu Moskvo, kiu sentas sin minacata de ĝi, forte protestis. La najbara Kaliningrada zono, kie Moskvo starigis siajn raketojn, estas konsiderata de Pollando (kaj de NATO) kiel altgrada danĝero, ĉar en Varsovio oni timas, ke la rusoj povus krei koridoron ĉe la pol-litova limo inter la Kaliningrada zono kaj Belorusio. En la tuta diskuto pri rifuĝintoj el Azio kaj Afriko, kiuj amase invadis Eŭropon, Varsovio obstine kontraŭstaras akcepti la devigan kvoton diktitan de Bruselo pri la disdivido de tiaj rifuĝintoj inter la EU-membroŝtatoj. Kiel en multaj aliaj orienteŭropaj landoj ankaŭ en Pollando la islamo estas konsiderata kiel fremda kaj danĝera elemento en Eŭropo.

Tiu tuta politiko de PiS eble havas sian ekzistorajton, se la retoriko de ĝiaj protagonistoj ne similus al sinteno de fanatika ideologia fundamentalismo, laŭ kiu PiS en ĉiu angulo vidas konspirantojn, malamikojn, komunistojn kaj naziojn, la hororfantomojn de la pasinteco. Laŭ la opinio de la ideologoj de PiS, post la kolapso de la komunismo Pollando ne evoluis kiel liberalisma, merkatekonomia demokratio, sed kiel „postkomunisma fasada demokratio“, en kiu koruptaj ekskomunistoj, sekretaj agentoj kaj novriĉaj profituloj diktas la tonon. En tio PiS kondutas kiel reprezentanto de la „simplaj civitanoj“, kio manifestiĝas en popolisma retoriko kaj rekomendado de tradiciaj, „polaj“ solvoj, kiuj celas repuŝi nedeziratajn „fremdajn“ influojn kaj eviti la „vendadon“ de Pollando al maldekstraj liberalismaj kaj kosmopolitismaj elitoj.

Kadre de ĉi tiu artikolo ne eblas trakti ĉiujn facetojn de la politiko de PiS, sed en la sekvo ni koncentriĝu pri la praktikaj sekvoj de tiu politiko kaj prilumu kelkajn aktualajn kernajn punktojn, kiuj kaŭzis la konfliktojn kun Bruselo.

La konflikto de Pollando kun EU, pli precize dirite kun la EU-institucioj aŭ -instancoj kaj aliaj EU-membroŝtatoj, havas esence tri dimensiojn. Unue: En strategia rilato ĝi estas sekvo de la progresanta maleŭropigo de la pola politiko. Tio signifas, ke en Pollando la dubo kreskis, ke la blinda imitado de la okcidenteŭropaj evolumodelo kaj valorsistemo kaj la pli forta integriĝo de Pollando en la EU-strukturojn estas nepre dezirindaj. Male, PiS estas konvinkita, ke necesas korekti la integrajn ambiciojn favore al pli forta suvereneco kaj memstareco. Anstataŭ Eŭropa Unio en la nuna formo, PiS diris, ke ĝi preferus „Union de suverenaj ŝtatoj“. Due, ekzistas jura konflikto kun EU kaj trie malharmonias la politikaj interesoj inter la registaro en Varsovio kaj la EU-ŝtataro. Precipe rilate la transprenon kaj enkondukadon de la EU-juro en la membroŝtatojn la EU-komisiono reagas nervoze kaj minacas lezantojn per malagrablaj sankcioj, kiujn ankaŭ Pollando devas enkalkuli, se ĝi devias de la EU-normoj kaj iras propran vojon. Post kiam la Sejmo signalis aprobon de la reformoj de la justico, kiujn PiS volas antaŭenpuŝi, la EU-komisiono malfermis „punan“ proceduron kontraŭ Pollando. Cetere, tiajn formalajn procedurojn la EU-komisiono praktikas amase kontraŭ ĉiuj ajn membroŝtatoj, kiuj lezis la EU-regulojn: Komence de 2016 la EU-komisiono malfermis 986 tiajn jurajn procedurojn, kaj en la fino de la jaro ekzistis 1657 tiaj nesolvitaj proceduroj. La plej multaj konfliktoj estis registritaj en la kazo de Germanio! Nature, iuj kazoj ne estas sensaciaj, dum aliaj proceduroj vekas grandan publikan kaj internacian atenton en la gazetaro, ekzemple la rifuzo de la kvoto por rifuĝintoj, kiujn la EU-komisiono trudis al la membroŝtatoj, aŭ, kiel menciite, la ŝanĝo kaj lezo de la valida EU-juro. La EU-komisiono strikte traktas tiajn kazojn, ĉar ĝi volas eviti, ke la komunaj interesoj kaj projektoj, la kredindeco, prestiĝo kaj ekonomia valoro de la membroŝtatoj estu subfosataj. Ŝanĝo aŭ lezo de la EU-normoj kaj -leĝoj povus kaŭzi distanciĝon de membroŝtatoj de la unio kaj konduki al ĝia erozio entute. Tiaj tendencoj povus endanĝerigi la pacon en Eŭropo, kiun la unio volas longdaŭre sekurigi. En la kazo de Pollando, la EU-komisiono deziras, ke ĝi rezignu pri la utiligo de la terkarbo kaj enkonduku la eŭromonon. Certe, sub la PiS-regado tiaj ideoj estas iluziaj.

Nature, en Bruselo kaj aliaj EU-ŝtatoj oni esperas, ke la poloj ribelos kontraŭ la faroj de PiS. Kiel konate el pli fruaj tempoj, en Pollando ekzistas forta ribela kaj protesta tradicio por kontraŭstari ĉiuspecajn maljustaĵojn, do la popolo ne restos pasiva, kvankam tio lastatempe ŝajnis esti la kazo, ĝis nun. Dum 2017 en Varsovio kaj aliaj polaj urboj eksplodis amasaj protestoj; poloj, kiuj ne konsentis pri la faroj de PiS, laŭte manifestaciis sur la stratoj. Dum tiuj protestoj la homoj signalis apogon al la valida konstitucio, la ekzistantaj tribunaloj kaj juĝejoj. Eĉ gravaj protagonistoj de la katolika eklezio de Pollando komprenigis, ke ili ne konsentas pri la ŝanĝo de la valida jura praktiko. Tiuj protestoj kaj la internacia premo efikigis eĉ konkretan reagon de la prezidento de la ŝtato, Andrzej Duda, kiu vetois kontraŭ certaj decidoj de la parlamento. Tio estis malgranda sensacio, ĉar pri tiu prezidento oni pensis, ke li estas nura marioneto de PiS, kiu apogas kaj aprobas ĉiujn decidojn, kiuj venas de ĝia flanko. Tiu sinteno verŝajne eĉ kaŭzis krizon de konfido inter Duda kaj Kaczyński. La intencoj kaj faroj de PiS igis ankaŭ multajn juristojn, instituciojn kaj neregistarajn organizaĵojn esprimi siajn opiniojn. La kontraŭstaro de la civilsocio do ne devus esti subtaksata.

Junularo kaj ekonomio

Politikaj observantoj komentis (kaj lamentis), ke la junularo ne plu konas tian Pollandon, kia ĝi estis antaŭ 1989, kaj sekve ne komparas la nuntempon kun la tiama komunisma reĝimo, sed kun la okcidenteŭropaj landoj. Paco, malfermitaj limoj kaj komuna merkato estas memkompreneblaj. Aliflanke ŝajnas, ke Kaczyński ignoras, aŭ ne volas konfesi, ke ĝuste kiel membro de EU Pollando travivis nekredeblan (ekonomian) progreson, kiu estis ligita kun gigantaj investoj en la konstruadon de la publika infrastrukturo, precipe aŭtoŝoseoj kaj fervojoj. Sed la moderniĝo ne trafis nur tiujn sektorojn: La konstrua konjunkturo en Varsovio, same malbela kiel fascina pola ĉefurbo, kaj aliaj polaj urboj estas imponega, la pola ekonomio kreskas kvar procentojn en ĉiu jarkvarono, 17 miliardoj eŭroj da kapitalo fluis al Pollando, la pola zloto gajnis valoron kaj la interplektado kun la okcidenta, precipe germana ekonomio estis perfektigita. Okazis ne nur senekzempla moderniĝo en la urboj, sed ankaŭ la enspezoj de la homoj en la ´kamparo´ konsiderinde kreskis, kvankam kelkaj projektoj kiel ekzemple la futbalaj

stadionoj, kiuj estis starigitaj por la eŭropa ĉampionado de 2012, ne estas nepre daŭripovaj. Krom tio, la senlaboreco konsiderinde malkreskis. Nu, parto de tiu sukceso estas ŝuldata al la pola labormigrado al Britio kaj Irlando. Tamen, la bruta enlanda produkto de Pollando kun 424 miliardoj eŭroj (2016) restas relative modesta kaj neniel komparebla kun tiu de la grandaj okcidenteŭropaj landoj; tamen ĝi estas komparebla almenaŭ kun tiu de Belgio kaj estas ĉiukaze pli granda ol tiu de Aŭstrio, Danlando, Irlando, Finnlando, Portugalio, Grekio, Ĉeĥio aŭ Hungario. Pri tiu bona oka rango en la statistiko Pollando povas fieri, des pli ke ĝi fariĝis la plej forta ekonomia potenco en orienta Eŭropo. En tiu periodo Pollando ankaŭ sufiĉe sukcese majstris la mondan ekonomian krizon, kio estas dankata precipe al la registaro de Donald Tusk (kiun PiS nun senskrupule misfamigas kiel ĉefan malamikon kaj perfidulon de Pollando). Tusk povus fariĝi la venonta prezidento de Pollando, kion PiS, kiu prisilentas ĉiujn sukcesojn de Tusk kaj la atingojn de la antaŭaj registaroj, nature ege timas kaj volas nepre eviti.

Sed tio estas la unua flanko de la medalo. La aktuala ekonomia modelo devos esti ´savita´ per reformoj sur la kampoj de la labormerkato, kleriga kaj sansistemo kaj rilate la plibonigon de la kvalito de la varoj kaj servoj. Ankaŭ Pollando apartenas al tiuj landoj, en kiuj la socio rapide maljuniĝas. Krom tio, post kvaronjarcento de la neoliberalisma transformado aperis tuta fasko da sociaj problemoj, ekzemple malriĉeco de familioj kun multaj infanoj, de virinoj kaj malsanuloj, kiuj ne havas sufiĉe da mono por pagi sanservojn, kuracistojn, medikamentojn kaj restadojn en klinikoj. Ĉi tiuj homoj apartenas al la malgajnintoj de la transformado, kvankam ili honeste laboris dum la socialisma tempo. Milionoj da familioj vivas en tro malgrandaj loĝejoj, kiuj estis konstruitaj en tiu tempo. Aliaj gravaj problemoj estas la ege pli malaltaj salajroj kompare kun aliaj EU-landoj, la malekvilibrita aliro al publikaj servoj, la mizero en malsanulejoj, la komercigo de la publika trafiko kaj la regionaj diferencoj. Milionoj da poloj vivas aŭ kredas, ke ili vivas pli malbone ol sub komunismaj kondiĉoj. Maljusteco ekzistas ankaŭ en la lerneja sistemo kaj ĉe la aliro al la universitatoj. Mankas moderna seksa edukado, familia planado kaj laŭleĝa permeso de abortoj. La energio de Pollando baziĝas precipe sur la terkarbo kaj novaj energioj alfrontas tro da skeptiko kaj burokratiaj obstakloj. Kvankam en Pollando ekzistas partio de la verduloj, kiu defendas la klasikajn ekologiajn ideojn, ĝi ricevis tro malmultajn voĉojn por esti memstare reprezentata en la Sejmo kaj kune kun la „Unuiĝinta maldekstro", al kiu ĝi aliĝis, malaperis de la politika scenejo okaze de la balotoj en 2015. Aliaj grandaj problemoj koncernas la rentan kaj impostan sistemojn, kiuj devas esti urĝe reformitaj. La meza tavolo estas ŝarĝita per hipotekoj (ofte en svisaj frankoj). Vole nevole, aldoniĝas novtipaj aspektoj kiel azila kaj migra politiko, klimataj kaj mediprotektaj celoj, kiujn ankaŭ Pollando ne povos ignori aŭ eviti. Konsiderante tiun ĉi katalogon de aktualaj temoj kaj problemoj, oni devus kredi, ke sukceson devus havi precipe partioj kaj movadoj, kiuj pledas por valoroj kiel demokratio, egaleco, libereco, solidareco kaj ekologio. Ĝuste tiaj partioj mankas nun en la aktuala politiko de Pollando, kiu ŝajne kredas solvi siajn problemojn per malnovaj ideoj kaj receptoj, naciismo, kontraŭ-eŭropismo kaj ksenofobio. Ŝajnas, ke la respondeculoj de PiS parte ja reagis al tiuj defioj, sed ankaŭ la maldekstro ricevis imagon pri la solvotaj problemoj kaj probable konscias pri tio, sen tamen disponi pri la adekvataj fortoj kaj necesaj resursoj, ĉar la solvotaj defioj estas tro grandaj, sen ekstera helpo.

Stato de la opozicio

La senbridaj kapitalismaj reformoj de la pasintaj 20-25 jaroj do ne restis sen konsekvencoj por la socio kaj politiko de Pollando. Sendube, post la malvenko en la parlamentaj kaj prezidentaj balotoj de la jaro 2015, la pola opozicio, precipe ĝia Maldekstro, troviĝas hodiaŭ en sia plej profunda krizo depost la falo de la komunismo en 1989. En la aktuala konsisto de la pola parlamento fakte neniu maldekstra partio aŭ frakcio estas reprezentata, ĉar ĉiuj iamaj delegitoj de la „Unuiĝinta Maldekstro" perdis siajn mandatojn kun la rezulto, ke apenaŭ retroviĝis maldekstraj deputitoj en la Sejmo. Ĉu do la politika maldekstro estas vere tiel malpopulara en Pollando? Laŭ iu enketo de septembro 2016, do preskaŭ unu jaron post la lastaj parlamentaj balotoj, nur 3 procentoj de la demanditoj esprimis apogon al la „Unuiginta Maldekstro". Nu, laŭ Jarosław Kaczyński, Pollando estis ruinigita de la registaroj, kiuj gvidis ĝin antaŭ 2015. Ankaŭ ĉe parto de la junularo la maldekstro estas diskreditita. Sed kial? La „kulturo kontraŭ la transformado" direktas sin kontraŭ la establitaj partioj de la „Tria Respubliko", al kiu apartenis la malnova „Solidarność-generacio", kiu iniciatis kaj subtenis tiun transformon, sed ial perdis sian kredindecon, aŭ aktualecon. Estas do iom kurioze: La radikalaj naciismaj elementoj de la iama „Solidarność"-opozicio akiris la potencon, dum la liberalismaj kaj maldekstre orientitaj

intelektuloj, de kiuj multaj same devenis de tiu iama opozicio, estis forpuŝitaj de siaj iamaj kunbatalantoj kaj nun alfrontas problemon de la akcepteco. Kaj PiS kaj PO, kies protagonistoj same originas el la KOR-Solidarność-tendaro, estis fonditaj, kiel menciite, en 2001 okaze de skismo en tiu tendaro kaj de tiam kontraŭbatalas unu la alian, nur ĉar la unua parto de la tendaro estas pli dekstra kaj naciisma, dum la alia estas pli maldekstra kaj liberalisma. Ankaŭ la „Platformo" konsideras sin parte kristandemokratia kaj konservativa, do ne maldekstra en si mem, sed tamen liberalisma kaj grandparte senideologia. Laŭ kutima klasifiko de la partia spektro, oni povus nomi PiS partion dekstre kaj PO maldekstre de la mezo. Ĉi tiu movada skismo en la iama kontraŭkomunisma tendaro estas vera dramo por Pollando, kvankam ĝi estis verŝajne neevitebla, kaj necesa.

La ĝenerala krizo de la maldekstro en Eŭropo, precipe en Germanio kaj Francio, nature ne multe plibonigas la situacion de la maldekstraj fortoj en Pollando. Dum la partio SLD, kies elektantoj estas ĉefe maljunuloj kun postkomunisma koloro, estas disfalanta, ekzistas larĝa spektro de malgrandaj maldekstraj partioj, kiuj ne estas unuigitaj, kiel PiS. Kvankam SLD havas solidan membrobazon kaj sekurajn financojn, al ĝi mankas kredindeco; male ĝi havas la reputacion de partio de cinikaj kaj egoismaj funkciuloj. Mankas karisma partia pintulo same kiel klara politiko, kaj la juna generacio havas organizajn kaj intelektajn malfortojn. Povas esti, ke parto de la ambiciaj membroj ŝanĝos la partion kaj transiros al iu alia maldekstra movado kun pli pragmatisma kurso, kaze ke tia aperos kaj formiĝos kiel signifa politika forto. Kelkaj membroj de la social-liberalisma partio „Via movado" (Twój Ruch), kiu estis reprezentita en la Sejmo en la jaroj 2011-15, kaj iuj aktivuloj de NROj kaj virinaj movadoj fondis la „Iniciaton Pollando". Ĝi kunlaboras kun la civilsocio kaj la memadministraj organoj kaj eventuale transformiĝos al nova unuiĝo por partopreni en venontaj balotoj. Sennombraj anoj de tiu grupiĝo partoprenis en la surstrataj protestoj por defendi la konstitucion, kolektis subskribojn por pli liberala aborta leĝo kaj partoprenis en la debatoj ĉirkaŭ la skandaloj lige kun la reprivatigo. Ekzistas gvidaj figuroj kiel la virinoj **Barbara Nowacka** kaj **Paulina Piechna-Więckiewicz**, sed al ili mankas tutlanda organiza strukturo. Certaj esperoj estas ligitaj eble ankaŭ kun la partio „Razem" (Kune), tute nova grupiĝo, kiu estas organizita laŭ la tipo de la skandinavia socialdemokratio. Ankaŭ la aktivuloj de tiu ĉi partio engaĝiĝis en la sociaj protestoj de la lasta tempo. La partio, kiu konsistas precipe el urbaj intelektuloj, rifuzas la establitajn partiajn funkciulojn kaj klopodas atingi homojn, kiuj estas malkontentaj pri la politika situacio. Sed al ĝi mankas mono kaj sperto.

Sed anstataŭ tia partio, la elektantoj preferis la kuriozan partion „Kukiz´15", kiu estis fondita de la pola rokmuzikisto **Paweł Kukiz** (nask. 1963) en somero 2015 kaj kiu same kiel PiS estas karakterizata kiel dekstrema, popolisma, patriotisma, konservema, EU-kritika partio. Kun 1´339´094 voĉoj aŭ 8,81 procentoj ĝi tuj ricevis la trian lokon en la Sejmo. Kiel oni vidas laŭ tiu ĉi ekzemplo kaj kiel oni vidis en la pasinteco, en Orienta Eŭropo balotojn povas gajni kuriozaj ad-hoc-partioj, kiuj ekzistas nur de mallonga tempo kaj estis fonditaj ĉefe pro la altgrada popularеco de sia gvidanto, kaj evidente ankaŭ kiel esprimo de la protesto kontraŭ la establitaj partioj.

Serioza konkurento de la maldekstro estas ankaŭ la nova formaĵo „La Moderno" (Nowoczesna), kiu estis starigita en majo 2015 de la 45-jara ekonomiisto **Ryszard Petru**, kiu kolektis sian sperton en la tempo de Leszek Balcerowicz, la fama aŭtoro de la ekonomia transformado en Pollando. En la balotoj de 2015 lia partio ricevis 1´155´370 voĉojn, t.e. 7,6 procentojn kaj 28 mandatojn en la Sejmo. Post tiu sukceso ĝia popularеco ege kreskis, tiel ke kelkaj observantoj opiniis, ke ĝi povus anstataŭi la „Platformon". Poste „La Moderno" tamen estis retropuŝita, ĉar privataj skandaloj, en kiujn Petru estis envolvita, esence damaĝis al tiu partio, kiun Kaczyński nature klopodis kompromiti kaj diskrediti kun granda plezuro.

Al la maldekstra movado apartenas ankaŭ kelkaj sindikatoj kaj profesiaj organizaĵoj, iuj NROj kaj gazetoj (kiel *Krytyka Polityczna*).

Multaj adeptoj de la maldekstro esperis, ke post la transpreno de la povo PiS ripetos la samajn erarojn, kiujn ĝi faris antaŭ dek jaroj, kaj ke la retoriko pri solidareco kaj socia justeco malaperos favore al neoliberalisma politiko, kiun la maldekstruloj estus povintaj kritiki. Sed io alia okazis. La konservativa politiko de PiS, kiu volas realigi ambician familian politikon, kiu kaŭzas, ke la maldekstruloj estos devigitaj aŭ mem komenci liberalan debaton aŭ agnoski la sociajn meritojn de PiS, ĉar prezenti kredindan alternativan (maldekstran) socialan politikon estos malfacile, se grava politika aŭ ekonomia krizo ne okazos. Tiel PiS esperas, ke la maldekstro detruos sin mem kaj malaperos kiel

konkurento. Stabila ekonomia kresko gravas por la financado de la multekosta socia politiko de PiS. Pri tio respondecas financministro **Mateusz Morawiecki**, kiu ne volas diskriminacii eksterlandajn investorojn, sed kiu volas ankaŭ kuraĝigi lokajn investorojn. Ankaŭ li celas krei dekmilojn da laborlokoj. Sed ĝuste tiu loka ekonomio, kaj nature la eksterlandaj financistoj, ege malfidas al PiS.

Alia problemo de la maldekstro estas la naciismaj kaj ksenofobiaj tendencoj en la socio, precipe inter gejunuloj, kiuj sentas la bezonon de nova ribelemo kontraŭ la establitaj partioj. Tiuj tavoloj probable ne elektos maldekstrulojn. Do, la maldekstro staros antaŭ jena dilemo: Kiel defendi kaj reformi la liberalisman demokration sen perdi aŭ nebuligi la maldekstrajn idealojn en la komuna fronto kontraŭ PiS? Laŭ Stefan Chwin, konata pola verkisto, naskita en 1949 en Gdańsk, la liberalismo, al kiu mankas la idealo de la patriotismo, ne sukcesis krei pozitivajn simbolojn por la pola demokratio. Krom tio ekzistas la danĝero, ke eĉ pli radikalaj fortoj ol PiS povus kapti la okazon, profitante de la malkontenteco en la lando, kaj aperos sur la politika scenejo. La maldekstro do devos trovi plurajn ´naturajn´ aliancanojn en la pola socio, kiuj apogos ĝin en venontaj balotoj. Inter tiuj aliancanoj povus esti la t.n. meza klaso de la publika sektoro (oficistoj en la kleriga kaj sansistemoj), movadoj, kiuj celas altan vivnivelon, urbaj loĝantaroj kaj grupoj, kiuj sentas sin minacataj de PiS kaj estas seniluziigitaj de ĝi, civitanoj, kiuj celas konservi la juron kaj la civitanajn rajtojn validajn antaŭ PiS kaj kiuj timas, ke Pollando povus perdi la avantaĝojn de EU aŭ eĉ la membrecon en ĝi. Ankaŭ juristoj kaj artistoj povus aparteni al tiu cirklo. Kunigi tiujn heterogenajn tavolojn estos nefacile, eble iluzie. Ĉe la maldekstraj kaj liberalismaj fortoj devus okazi kvazaŭ iu miraklo, kiu kaŭzos ilian renaskiĝon. Ke la partia konstelacio en Pollando denove ŝanĝiĝos, estas malgraŭ la forta pozicio de PiS tute imagebla, se oni konsideras, ke en enketo de februaro aŭ marto 2017 la plimulto de la demanditoj respondis, ke ili ne voĉdonus por PiS, se nun okazus balotoj. Se PiS perdos la potencon, tio ne signifas, ke la „Civitana Platformo“ aŭtomate reakiros la antaŭan statuson, kvankam ĝi ricevis 24 procentojn de la voĉoj en la pasintaj balotoj. Post la foriro de Tusk al Bruselo, al la „Platformo” nun mankas forta personeco. Do, ĝi estos devigita kvazaŭ reinventi sin. Eble **Grzegorz Schetyna** (nask. 1963), la nuna gvidanto de PO, kiu estas tre sperta, serioza kaj ne kompromitita politikisto, ludos iun decidan rolon, kvankam al li mankas karismo kaj vizioj, per kiuj li povus konvinki la amasojn denove voĉdoni por la „Platformo“. La miraklo povus nomigi Tusk, kiu revenos al Pollando kaj fariĝos la venonta prezidento. Sed ĉu la poloj volos havi Tusk kiel ŝtatestron, estas tute alia demando. Multaj politikaj observantoj kredas, ke la gloraj tempoj de PO kaj Tusk pasis kaj ne revenos. Por ricevi pli da klareco necesus fari novajn enketojn. Tamen, la „Platformo“ estas la sola signifa politika forto en Pollando, kiu povos almenaŭ kontraŭstari la ekscesojn de PiS. Cetere, preskaŭ neniu scias, ke la „Civitana Platformo“ starigis „ombran kabineton“, kies membroj pedante observas kaj komentas la politikon de siaj PiS-kontraŭuloj kaj preparas sin por nova registara funkcio. Cetere, la oportunisma kunlaboro de „La Moderno“ kun la „Platformo“ estas imagebla, kvankam ili ne nepre ´amas´ unu la alian. Kaj en la ´kamparo´ plej forta estas la Pola Kamparana Partio, kiu direktas sin ĉefe al la kamparanoj mem. Cetere, laŭ iniciato de la pli fruaj kontraŭkomunismaj opoziciuloj estiĝis ankoraŭ alia nova civitana movado, kiu portas la nomon „Komitato por la defendo de la demokratio“ (KOD, laŭ la modelo de KOR); ĝi estas gvidata de ŝajne iom dubinda karismulo, **Mateusz Kijowski**, kies reputacio rapide falis post kiam fariĝis konate, ke li maljuste traktis sian eksedzinon kaj misuzis partian monon. Tiajn aferojn poloj tute ne ŝatas.

Grzegorz Schetyna, Paweł Kukiz, Mateusz Kijowski Paweł Kukiz, Barbara Nowacka, Paulina Piechna-Więckiewicz, Mateusz Morawiecki (fotoj: Vikipedio)

PiS postulas de Germanio pagi militajn reparaciojn

Sojle de la datreveno de la germana atako kontraŭ Pollando de la 1a de septembro 1939, ĉefministrino Beata Szydło ripetis ĉi tiun postulon de la reparaciaj pagoj. Laŭ ŝi, la poloj „estas viktimo de la dua mondmilito kaj nia sufero neniam plu estis rekompencita“ kaj „rajtas postuli reparaciajn pagojn“. Fakte, ĉi tiun postulon PiS esprimis jam en 2004. Sed la tiama ĉefministro Marek Belka rifuzis la postulon kaj la pola registaro ankoraŭfoje eksplicite rezignis pri ĉiuspecaj kaj ĉiuflankaj reparaciaj pagoj. Pro tio PiS postulas, ke Belka estu sendita al la tribunalo. Szydło, kiu estas ĉio alia ol simpatia persono, reagis per rekomendo al la kritikistoj de la reparaciaj pagoj, ke ili finfine „lernu ĉi-rilate sian historian lekcion“. Kvankam dum la unua PiS-regado de 2005-7 regis silento pri tiu ĉi temo, ĝi estis nun revarmigita, post kiam la PiS-deputito Arkadiusz Mularczyk taskis la sciencan sekcion de la Sejmo komence de aŭgusto 2017 sondi, ĉu reparaciaj postuloj estus jure pravigeblaj. Mularczyk estas konvinkita, ke la poloj „estis trompitaj dum multaj jaroj per frazaĵoj pri pol-germana interpaciĝo“ kaj ke „la germanoj praktikis rilate al Pollando senskrupulan kaj senkoran politikon por eviti reparaciajn pagojn por polaj civitanoj, dum al aliaj ŝtatoj ili pagis reparaciojn“. Ĉu li pravas? En Pollando cirkulas diversaj ekspertizoj, kiuj devus pruvi la pravecon de la vidpunktoj de PiS. Eĉ estis menciitaj konkretaj ciferoj pri la damaĝoj, kiujn la germana milito kaŭzis al Pollando: temas pri sumo, kiu varias inter 845 kaj 5500 miliardoj eŭroj. La ĉefan ekspertizon publikigis la jura servo de la Sejmo la 11an de septembro 2017, kiu enhavas proprajn kalkulojn pri militaj damaĝoj kaj perdoj kaj liveras la argumentojn el pola vidpunkto. Laŭ postmilitaj pritaksoj, la materiaj damaĝoj rilate la ŝtatan kaj privatan posedaĵon, kiuj estis kaŭzitaj de Germanio lige kun la dua mondmilito, sumiĝis je 258 miliardoj antaŭmilitaj zlotoj, kiuj egalvaloras al 48,8 miliardoj usonaj dolaroj laŭ la kurso de aŭgusto 1939 (en 1970 tiu valoro estis rekalkulita je 172,2 miliardoj dolaroj). Sed Germanio fiksis nur la sumon de 600 milionoj DM, kiuj estis antaŭviditaj por polaj civitanoj. Sed tiu sumo, kiu eĉ ne valoras 1 procenton de la reparacioj, kiujn Germanio pagis al aliaj landoj, tute ne sufiĉas kompare kun la realaj damaĝoj kaj perdoj, kiujn Pollando devis elteni. Ĉu Pollando estis trompita? Witold Waszczykowski, ministro pri eksteraj aferoj, opinias, ke 840 miliardoj eŭroj estus adekvata sumo, kvankam ankaŭ unu biliono povus esti imagebla. Per tiuj ĉi sumoj devus esti rekompencitaj ne nur la materiaj damaĝoj, inkluzive la totalan detruon de Varsovio, sed ankaŭ la ses milionoj da mortigitaj poloj, duone kristanoj, duone judoj. Ĉiu sesa polo perdis sian vivon pro la perforto de la germana armeo, SS kaj Gestapo en la jaroj 1939-45. Pliaj dek milionoj da poloj estis koncernitaj de la germanaj krimoj. Kompare kun la tiama nombro de polaj loĝantoj kaj kun la tuta posedaĵo Pollando suferis dum la dua mondmilito la plej multajn perdojn de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj. Alia afero estas, ke la parto de reparacioj, kiujn Germanio pagis al Sovetunio, ne atingis Pollandon, kvankam la „Traktato de Potsdamo“ de la 5a de junio 1945 klare antaŭvidis, ke „Sovetunio kontentigos la reparaciajn pretendojn de Pollando per propra parto por la reparacioj“. 15 procentoj de la germanaj pagoj, kiujn Sovetunio ricevis, devintus esti pludonitaj al Pollando, sed ĉar Pollando oficiale rezignis en 1953 pri reparaciaj pagoj, ĝi ne ricevis ilin. Ĉu Pollando estis trompita? Cetere, en 1946 estis subskribita la „Pariza Traktato pri reparacioj“, sed Pollando ne estis koncernita de ĝi. En 1947 la pola registaro (en Londono) rememorigis pri tiu potsdama decido.

Efektive, la 23an de aŭgusto 1953 la komunisma pola registaro subskribis la rezignon de Pollando pri reparaciaj pagoj flanke de Germanio. Sed la politikistoj de PiS pridubas la legitimecon de tiu deklaro, kiu koncernis nur la orientan parton de Germanio (GDR). Laŭ PiS, tiu subskribo ne povas esti konsiderata kiel suverena ago, ĉar ĝi okazis sub la premo de Sovetunio, kies satelita ŝtato Pollando estis. Oni argumentas, ke tiu decido kontraŭis la tiaman konstitucion de Pollando, ĉar la tiama pola Ŝtata Konsilio respondecis pri tiaj traktatoj, anstataŭ la Konsilio de ministroj. Kaczyński aldonis, ke „nia rezigno estis neniam registrita de Unuiĝintaj Nacioj“, kvankam la demando de la germanaj reparacioj estis levita de la pola delegito dum la 22a kaj 23a kunsidoj de la Homrajta Komisiono de UN (70aj aŭ 80aj jaroj). Berlino respondis, ke la pola postulo kontraŭdiras la „2-plus-4-Traktaton“ de la 12a de septembro 1990 inter FRG kaj GDR unuflanke kaj la kvar venkintaj potencoj aliflanke. En ĉi tiu interkonsento, kiu faris la reunuiĝon de Germanio ebla kaj anstataŭis la pactraktaton, kiu devintus esti subskribita 45 jarojn post la fino de la Tria Regno, Pollando eĉ ne estis partnero de la subskribintoj, do ne povis postuli ion ajn. Pollando ĉiam estis ekskludita el kontraktoj de Germanio kun plej diversaj landoj. Kiel la ekspertizo de la Sejmo montras, inter 1959 kaj 1964 12 eŭropaj ŝtatoj ricevis entute 997 germanajn markojn kiel militan rekompencon, eĉ Svislando ricevis dek milionojn. Tamen, en 1972 Germanio pagis al Pollando cent milionojn germanaj markoj favore al viktimoj de pseŭdomedicinaj eksperimentoj, sed tio ne estis reparaciaj pagoj, sed humanitara helpo, same kiel alia monpago, kiu

rezultis el iu fondaĵo pri pol-germana interpaciĝo, kiu estis fondita en oktobro 1991. Kiel la ekspertizo de la Sejmo montras, ĉi tiu fondaĵo pagis inter 1992 kaj 2004 731´843´600 zlotojn al 1 ´060´689 personoj, kio signifas po 689,97 zlotojn por persono (kio estas ĉ. 160 eŭroj). Sed granda parto de pli ol 10 milionoj da homoj, kiuj estis lezitaj pro la krimoj de la dua mondmilito, intertempe forpasis, sen esti rekompencitaj.

La ekspertizo de la Sejmo, kiu parolas pri „diskrimnacia“ politiko de Germanio rilate al Pollando, estas forta tabako, sed ĉu ĝi povos ŝanĝi la opinion de la germanaj politikistoj? Ankaŭ la scienca servo de la germana parlamento konkludis, ke ĉiuj reparaciaj postuloj pro germanaj krimoj dum la dua mondmilito nuliĝis per la subskribo de la „2-plus-4-Traktato“ de 1990, des pli ke „kadre de la negocoj Pollando rezignis pri tiu postulo almenaŭ silente“. Do, tiu traktato fermis ĉiujn postulojn pri reparacioj, kiel konfirmis la fakuloj de la Bundestago. Ĉu Pollando estis trompita? Jarosław Kaczyński estas konvinkita, ke la demando pri la reparaciaj pagoj estas nesolvita, krom tio, laŭ la valida internacia juro militaj krimoj ne preskriptiĝas, kio inkluzivas reparaciajn pagojn por rekompenci la damaĝon pro tiuj krimoj. Laŭ li, „ĉi tiu fakturo neniam estis pagita en la pasintaj 70 jaroj kaj do en jura senco daŭre aktualas“, tiel ke Pollando rajtas pretendi reparaciajn pagojn, kiel la ekspertizo de la Sejmo emfazas. Ankaŭ Antoni Macierewicz, konata kiel dekstrema pola ministro pri defendo, kunkantis en la ĥoro, ke „la germanoj ŝuldas al Pollando reparaciajn pagojn“. En enketo de aŭgusto 2017 63 procentoj de la demanditoj respondis, ke ili aprobas la postulon pri reparaciaj pagoj. Iusence Kaczyński eble eĉ pravas, ĉar ĉiuj kontraktoj kaj traktatoj inter FRG kaj la socialisma pola respubliko estis subskribitaj kun ekskludo de definitiva reguligo en validigota pactraktato, kiu devintus definitive solvi la demandon de la reparacioj. Ankaŭ en aliaj interkonsentoj kiel en la german-pola „Traktato pri la fundamentoj de la normaligo de la reciprokaj rilatoj“ de decembro 1970, kaj en la „Traktato pri german-pola najbareco“ de 1991 la demando de la reparacioj ne estis tuŝita.

Laŭ iuj gvidaj germanaj juristoj, kiuj referencas al la supre menciitaj traktatoj kaj kontraktoj, Varsovio povos kaj devos forgesi la unuflankan postulon pri reparaciaj pagoj, ĉar al ĝi simple mankas la jura bazo. Ĉi-koncerna plendo de Pollando fiaskus antaŭ internacia tribunalo, kiel montris la kazoj de Italio kaj Grekio, kiuj same plendis kontraŭ Germanio, postulante reparaciajn pagojn de ĝi. Aliaj juristoj havas tamen pli malfermitan orelon por la deziroj kaj postuloj de la poloj, ĉar laŭ ili la demando de la reparacioj efektive ankoraŭ ne estas solvita. La ekspertizo de la Sejmo, kies argumentoj estas serioze konsiderindaj, havas altgradan kredindecon. Ke tiu reparacia postulo estis revarmigita de Varsovio ĝuste antaŭ la parlamentaj balotoj de septembro 2017 en Germanio, klarigas la dilemon de PiS. Ĝi estas pura provoko de ĝia flanko kaj havas konkretajn politikajn motivojn kaj kaŭzojn. Observantoj supozas, ke la kontraŭdemokratiaj reformoj kaj la aborta demando, kiuj kaŭzis en Pollando amasajn manifestaciojn, verŝajne surprizis la politikistojn de PiS, kiuj troviĝas sub premo, pro kio ili decidis reutiligi la kontraŭgermanan karton, per kiu oni kredeble povas regajni la ĉagrenitan publikon. Samtempe, PiS sentas sin en la rolo de eterna viktimo – de Germanio, kiu laŭ PiS estas la ĉefa motoro de la planitaj EU-sankcioj kontraŭ Pollando. Dum la varsoviaj politikistoj premas (aŭ provas ĉantaĝi) Germanion, la germanoj alvokis la polojn havi komprenon kaj paciencon. Sed ŝajnas, ke tiu strategio ne efikas. Kvankam esence temas nur pri iniciato de PiS, diversaj ekspertoj konsilas al la poloj konduti pli modere kaj pli modeste rilate al ĝiaj najbaroj. Kaj la EU-komisiono esperas, ke Pollando restos racia. Ankaŭ la konferenco de polaj episkopoj trovas la postulon de la reparacioj malbona ideo kaj timas, ke la rilatoj inter Pollando kaj Germanio povus malboniĝi. Kiel membro de EU Pollando ricevis miliardajn sumojn el Bruselo, kiu esence helpis, kun la ĉefa partopreno de Germanio, ke Pollando povu financi sian publikan infrastrukturon kaj multon pli. Do, la EU-membreco, la mono, kiun EU kaj Germanio sendis al Pollando kaj la tuta bonvolo de Eŭropo rilate al Pollando povas iusence esti konsiderata kiel kontentigo de Pollando, kvankam oni ne argumentas tiel. Ĉu Pollando do estas maldankema? Malgraŭ tio, kaj sendepende de la polaj postuloj, Germanio kaj aliaj landoj, kiuj ricevis militajn reparaciajn pagojn de ĝi, estus bone konsilataj investi kelkajn aldonajn miliardojn por financi la infrastrukturon kaj aliajn utilajn projektojn en Pollando, por rekompenci la marŝalan planon, de kiu Pollando ne povis profiti post la dua mondmilito. Mono ekzistas. Se ne ili faros tion, la ĉinoj estos pli rapidaj.

Muzea skandalo en Gdańsk

Laŭ kiu maniero PiS rilatas al projektoj de siaj politikaj kontraŭuloj kaj kiel ili povas procedi kun ili, havante la potencon en la ministerioj kaj tribunaloj, ilustras la sekvanta kazo de la „Muzeo pri la Dua Mondmilito“ en la urbo Gdańsk. La konflikto inter PiS kaj PO estas ankaŭ konflikto inter Kaczyński kaj Tusk, mem historiisto kun gdanska origino, kiu esence apogis tiun muzean projekton kiel politika patro, kaj respeguligas ankaŭ la konscion pri la historio kaj la interpretadon de ĝi. La portantoj, patronoj aŭ aŭspiciantoj de la muzeo estas la sindikato „Solidareco“, kies iamaj protagonistoj hodiaŭ parte simpatias kun PiS, la kulturministerio (PiS), kiu financas ĝin, la regiona ĉefo Mieczysław Struk (PO) kaj la ĉefurbestro de Gdańsk, Paweł Adamowicz (PO), kiu oficas de 1998. Eĉ Lech Wałęsa estas iel ligita kun ĝi. La urbo posedas la imponan konstruaĵo de la muzeo, kiu estis iniciatita en 2007 kaj kostis cent milionojn da eŭroj el polaj kasoj. La plimulto de la mono por la ekspozicio venis de la kulturministerio, kiu diktas la tonon post la gajnitaj balotoj de 2015 kaj kiu provas influi la politikon de la muzeo en la senco de PiS. La ekspozicio montras kaj heroojn, kaj viktimojn – kaj kulpantojn. Tiu paraleleco estas granda problemo. Chwin avertas, ke en Pollando oni reagas alergie, se en pola muzeo oni prezentas Pollandon ankaŭ kiel perdinton aŭ kulpanton. Precipe ĉi-lasta momento de la ekspozicio tute ne plaĉis al ĝi, pro kio ĝi sabotis kaj kontraŭbatalis ĉi tiun muzeon per ĉiuj rimedoj, kaj intervenis per ruza truko. Por plene submeti ĝin al sia politika kontrolo, PiS havis la ideon kunigi ĝin kun la planata muzeo „Westerplatte“ (kiu estis fondita en decembro 2015 kiel kontraŭ-projekto al la Muzeo pri la Dua Mondmilito). La 30an de januaro 2017 la muzeo estis fermita kaj la 23an de marto oficiale inaŭgurita. Malgraŭ plendo flanke de la muzea direktoro, la supera pola administra tribunalo tamen liberigis la vojon en la senco de PiS: La 6an de aprilo 2017 okazis la formala kuniĝo de ambaŭ muzeoj, direktoro prof. **Paweł Machcewicz** (nask. 1966) estis maldungita, nova direktoro (por ambaŭ muzeoj) fariĝis iu **Karol Nawrocki** (nask. 1983), iama futbolisto kaj boksisto, kaj historiisto. En la du unuaj semajnoj de ĝia ekzisto, la muzeo allogis 15´000 vizitantojn, poste la nombro eĉ dekobliĝis ĝis junio. Kiel la maldungita direktoro klarigis en *NZZ*-intervjuo en junio 2017, la ekspozicio, kiu posedas riĉan kaj unikan kolekton kaj kies objektivecon kaj valoron neniu serioza pola historiisto kontestis, restis dume neŝanĝita, sed Machcewicz timas, ke Nawrocki volas ŝanĝi ĝin tiel, ke ĝi prezentu tute alian bildon pri la historio kaj per tio probable detruos la tutan originan koncepton, kiu estis ellaborita kaj realigita en kunlaboro kun vasta internacia fakularo, kiu celas prezenti modernan komprenon de la historio. Sed la aktuala kulturministro de PiS, Piotr Glinski, fakte jam anoncis, ke oni volos ŝanĝi la ekspozicion. La ĉefaj riproĉoj de PiS kontraŭ la koncepto de Machcewicz estas, ke la ekspozicio estas tro internaciisma, kosmopolitisma aŭ pacisma kaj nesufiĉe pola. En kazo de ŝanĝo Machcewicz ne nur volos paroli pri cenzuro, sed li ankaŭ planas plendi pro malrespektado de la aŭtoraj rajtoj.

Certe, similaj problemoj ekzistas ankaŭ en aliaj landoj, sed Basil Kerski, ĵurnalisto, publicisto, socia aktivulo kaj estro de la Solidarność-Centro en Gdańsk, multe zorgas pri la stato de la demokratio kaj kulturo en Pollando kaj pri la reputacio de Pollando en la resto de la mondo. Laŭ li, la provo de PiS limigi la sendependecon de la justico kaj ĝia naciisma politiko esence damaĝis la demokratian kulturon en Pollando, sed pro la ekzisto de sufiĉe forta civilsocio la pola demokratio ankoraŭ ne estas perdita. Multaj estroj de grandaj polaj urboj ne apartenas al PiS. Kerski precipe maltrankvilas pri la fortiĝanta antaŭjuĝo de la okcidenteŭropanoj, kiuj kredas, ke en la postkomunismaj landoj la demokratio estas malforta kaj ke tie reaperas aŭtoritatismaj tendencoj. Tamen, tiel simplaj la aferoj ne estas. Laŭ Kerski, la evoluo de la politika kaj kultura en Pollando estas klarigebla duone per internaj, duone per eŭropaj kaj universalaj defioj. Tipe pola estas la radikaliĝo de parto de la katolika eklezio, precipe la medio ĉirkaŭ la redemptoristo Tadeusz Rydzyk, kiu kompreneble estas aliancano de PiS kaj funkciigas la faman stacion „Radio Maryja“, kiu havas enorman influon en la pola socio. La alia duono de la defioj koncernas la globaliĝon, la kritikon pri la neoliberalismo kaj la malfermiĝon de la socio per la interreto. Sed ege grava problemo estas la forgesado de la historio aŭ la erozio de la memoro pri ĝi. La junaj generacioj ne plu konas la komunismon kaj ne sufiĉe konscias pri la atingoj en Eŭropo: paco, demokratio, libereco, komuna merkato, malfermitaj limoj.

Probable, PiS do retorike plubatalos sur diversaj batalkampoj kaj ĉe diversaj frontoj, ĝis la fina venko. Certe, ĝi profitas de la malkontenteco en parto de la pola popolo pro malbona individua situacio. Pli grava ol ĉiuj menciitaj pseŭdaj debatoj estas la zorgo pri Pollando, kiu povus eksiĝi el EU, ĉu per la propra volo, ĉu pro la decidoj de Bruselo, kiu povas sankcii Pollandon per la perdo de la voĉdonrajto en la konsilio de la EU-membroŝtatoj. La EU-komisiono jam delonge ekzamenas, ĉu Pollando vere lezis la

EU-kontraktojn kaj la valorojn de EU en si mem. Bruselo baldaŭ perdos la paciencon kaj efektivigos la minacojn. En kazo de sankcioj kontraŭ Pollando, la polaj reagoj estus neantaŭvideblaj. La seniluziiĝo pri la Okcidento kaj la ofendiĝo de la fiero kaj honoro, kiuj estas forta elemento en la psikologio de la orienteŭropanoj, povus konduki al pli profunda krizo. La PiS-registaro verŝajne ne montros kompromisemon kaj restos obstina pri siaj postuloj kaj vidpunktoj, ĉar temus pri alta prezo, kiu estus pagenda en kazo de cedo. La krizo inter la okcidenteŭropaj landoj kaj Pollando do estas evidenta, dum Varsovio povas parte kalkuli pri la apogo de la t.n. Viŝegrád-bloko (al kiu krom Pollando apartenas ankaŭ Hungario, Slovakio kaj Ĉeĥio), kiu same praktikas EU-skeptikan sintenon kaj volas flegi bonajn rilatojn kun Ruslando. Tamen, 88% de la poloj volas konservi la EU-membrecon de Pollando. Se tamen temas pri la devo akcepti rifuĝintojn, 51% de poloj favoras eksiĝon de Pollando el EU. Inter poloj regas jena opinio: La plej bonajn aferojn ni transprenis de EU, sed nun ni ne volas akcepti ankaŭ geedziĝon inter samseksemuloj, feministojn, rifuĝintojn el Azio kaj Afriko kaj la abolon de la terkarbo, kiu produktas nian energion. En okcidenta Eŭropo multaj homoj vidas Pollandon kiel naŭzan egoiston, kiu volas nur nian monon, sed pri solidareco ĝi fajfas. Aliaj opinias, ke Eŭropo ekspluatas Pollandon, ke ĝi produktas por la okcidenta merkato, ke la poloj estas politike manipulataj kaj misuzataj kiel malmultekostaj laborfortoj, ke ili estas nur duarangaj kaj ne sufiĉe respektataj civitanoj de Eŭropo, ktp. Laŭ tiu karuselo de antaŭjuĝoj la rilatoj inter Pollando kaj la cetera Eŭropo probable ne pliboniĝos, ĉar la malnovaj stereotipoj reaperos kaj firmiĝos. Tio povus minaci la eŭropan projekton de la unueco. Estas grave, ke Pollando estas respektata kiel forta, signifa kaj valora partnero, sendepende de la aktuale reganta registaro. Germanio kaj multaj aliaj landoj sendube faras tion, kvankam ĉiu ŝtato defendas siajn proprajn interesojn. Sed ankaŭ Eŭropa Unio devos reformiĝi. Neglekti kiel ajn orientan Eŭropon fare de la Okcidento estus granda, fatala eraro, ĉar en tia kazo la homoj en la Oriento sentus sin forlasitaj kaj trompitaj. Perdi Brition estas malbone, sed perdi Pollandon kaj orientan Eŭropon estus pli malbone. La okcidento kaj oriento de Eŭropo ne povas ekzisti unu sen la alia. En Pollando necesas atendi la venontajn balotojn por vidi kiel la poloj pritaksos la regadon de PiS, kiun ĝi eble denove malelektos favore al politika forto, kiu celas restarigi la bonajn rilatojn kun Eŭropo, malgraŭ la ekzistantaj konfliktoj, kiuj devos esti solvitaj. Sed mondo sen konfliktoj ne ekzistas, kaj en Pollando dekstruloj, maldekstruloj, konservativuloj kaj liberaluloj ĉiam alternis unu la aliajn en la pinta registara politiko. Kiuj kredas, ke iuj el ili regos eterne, tiuj eraras, ĉar tiuj falos verŝajne pli rapide ol ili mem imagas.

© Andreas Künzli, decembro 2017

PS Post la verkado de ĉi tiu teksto venis la novaĵo, ke Beata Szydło demisiis la 7an de decembro 2017 kiel ĉefministro de Pollando kaj ke PiS anoncis, ke Mateusz Morawiecki, ĝisnuna ministro pri financoj, anstataŭos ŝin ekde la 11a de decembro. Kvankam Morawiecki estas konsiderata kiel pli modera kaj pli eŭropema PiS-politikisto, li jam anoncis, ke ankaŭ li ne toleros, ke EU „ĉantaĝu“ Pollandon rilate la demandon pri la rifuĝintoj. La 9an de januaro 2018 pluraj ministroj de la registaro Morawiecki, inter alie tiu pri eksteraj aferoj, defendo kaj naturprotektado Waszczykowski, Macierewicz kaj Szyszko, estis anstataŭigitaj per novaj homoj. Ankaŭ la ministro pri internaj afroj estis elŝanĝita, sed la ministro pri justico restis.

Utiligitaj fontoj:

https://de.wikipedia.org/wiki/Parlamentswahl_in_Polen_2015

https://de.wikipedia.org/wiki/Prawo_i_Sprawiedliwość

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen206.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen204.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen199.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen197.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen196.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen191.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen176.pdf

http://www.laender-analysen.de/polen/pdf/PolenAnalysen171.pdf

http://www.dw.com/de/polen-pocht-auf-reparationen/a-40310276

http://polen-heute.de/polnischer-vize-justizminister-fuer-die-todesstrafe-95763

https://www.saarbruecker-zeitung.de/politik/das-schlimmste-was-passieren-konnte_aid-1613917

http://www.faz.net/aktuell/wirtschaft/polen-first-warschau-wird-nationalistischer-15189599.html

http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/polen-szydlo-will-bald-forderungen-zu-reparationen-vorlegen-15188706/polen-szydlo-will-bald-15188708.html

http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/polens-reparationsforderungen-laut-gutachten-begruendet-15193317.html

http://www.faz.net/aktuell/politik/polens-argumentation-deutschlands-haltung-gegenueber-dem-gutachten-des-sejm-15193897.html

http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/polen-macht-mit-reparationsforderungen-politik-15176037.html

http://www.faz.net/aktuell/politik/fluechtlingskrise/wahlkampf-in-polen-jaroslaw-kaczynski-ueber-fluechtlinge-13856938.html

https://de.sputniknews.com/politik/20170912317410149-polen-reparationsforderungen-an-deutschland-rechtswissenschaftler-gibt-schaetzung

http://www.spiegel.de/politik/ausland/donald-tusk-drama-um-wahl-und-polen-ueberschattet-eu-gipfel-a-1138113.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/polens-praesident-duda-stoppt-justizreform-und-stuerzt-regierung-in-die-krise-a-1159506.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/polen-jaroslaw-kaczynski-nennt-opposition-in-debatte-ueber-justizreform-verraeter-a-1158632.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/polen-warum-die-regierung-rechtsextreme-hofiert-a-1177810.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/polen-aussenminister-verteidigt-demo-von-ultrarechten-in-warschau-a-1177705.html

http://www.zeit.de/politik/ausland/2017-07/polen-andrzej-duda-praesident-gegen-gerichtsreform-pis-regierung

http://www.zeit.de/politik/ausland/2017-07/polnisches-parlament-verabschiedet-justizreform

http://www.zeit.de/politik/ausland/2017-07/polen-justizreform-regierung-gewaltenteilung-proteste

http://www.zeit.de/politik/ausland/2017-11/unabhaengigkeitstag-warschau-polen-rechtsextreme-marsch

http://www.spiegel.de/politik/ausland/polen-bischoefe-bangen-wegen-reparationsforderung-um-verhaeltnis-zu-deutschland-a-1166835.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/polen-wegen-justizreform-eu-kommission-droht-mit-entzug-von-stimmrecht-a-1158752.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/eu-wie-polen-aus-der-europaeischen-union-stolpern-koennte-a-1165610.html

http://www.sueddeutsche.de/kultur/weltkriegsmuseum-danzig-mehr-patriotismus-weniger-schuld-1.3348470

http://www.tagesspiegel.de/kultur/streit-um-polnisches-kriegsmuseum-geschichtsbild-von-regierungsgnaden/19205344.html

https://www.welt.de/politik/ausland/article167165886/EU-leitet-Vertragsverletzungsverfahren-gegen-Polen-ein.html

https://www.welt.de/geschichte/article168440067/Warum-Deutschland-Polen-keine-Reparationen-schuldet.html

https://www.blick.ch/news/ausland/polen-polnische-minister-wollen-warschauer-kulturpalast-abreissen-id7604890.html

https://www.nzz.ch/international/vorladung-fuer-tusk-in-einem-bizarren-prozess-in-polen-fuenf-antworten-zu-smolensk-ld.1308996

https://www.nzz.ch/feuilleton/weltkriegsmuseum-in-danzig-in-polen-dokumentiert-ein-museum-die-schrecken-des-zweiten-weltkriegs-und-blickt-ueber-dessen-ende-hinaus-ld.155751

https://www.nzz.ch/feuilleton/aktuell/danziger-tauziehen-um-die-polnische-geschichte-ein-museum-als-schlachtfeld-ld.1302384

https://www.nzz.ch/international/vorladung-fuer-tusk-in-einem-bizarren-prozess-in-polen-fuenf-antworten-zu-smolensk-ld.1308996

https://www.nzz.ch/feuilleton/die-polnischen-liberalen-haben-sich-den-patriotismus-wegnehmen-lassen-ld.1322698

http://www.faz.net/aktuell/feuilleton/polens-museum-des-zweiten-weltkriegs-14937537.html

https://kurier.at/politik/ausland/polen-regierungschefin-szydlo-verurteilt-extremismus/298.508.405

https://www.tagesanzeiger.ch/wirtschaft/standard/China-weibelt-im-Wilden-Osten/story/22031700

http://www.zeit.de/2017/52/polen-regierung-mateusz-morawiecki-pis-radikalitaet

http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/warum-wirft-polen-drei-eu-gegner-aus-dem-kabinett-15382898.html

http://www.muzeum1939.pl/en/home-page

http://www.sejm.gov.pl/Sejm8.nsf/komunikat.xsp?documentId=CBB89BA533005828C1258198002C838E

http://www.sejm.gov.pl/media8.nsf/files/KKOI-AR4BP5/%24File/1455%20-%2017%20DE.pdf

http://krytykapolityczna.pl

https://de.wikipedia.org/wiki/Muzeum_II_Wojny_Światowej

https://de.wikipedia.org/wiki/Westerplatte-Museum

https://de.statista.com/statistik/daten/studie/188776/umfrage/bruttoinlandsprodukt-bip-in-den-eu-laendern

https://pl.wikipedia.org/wiki/Premierzy_Polski

https://de.wikipedia.org/wiki/Mateusz_Morawiecki

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, decembro 2017

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch). Pollandon li vizitis plurajn fojojn, unuafoje en 1981.